E
# LA PACDEFENDANTO

N-o.56. NEREGULA INFORMA CIRKULERO POR ĈEĤOSLOVAKIO Aŭgusto Septembro 1956

## LA TEMPO KREAS HEROOJN

Antaŭ nelonge k-do.Hruŝĉev kaj aliaj ekkuraĝis malkovri al tuta mondo la malgustan sintenon de Stalin,lian personan kulton kaj diktatorecon,kiu ofte estis kontraŭ la proleĝoj mem,kaj kaŭzis grandajn domaĝojn al la prudenta evoluo kaj kresko de la komunista partio.

Dum lia potenca regado multaj homoj,ankaŭ partianoj,kiuj kuraĝis havi diferencajn opiniojn al tiuj de Stalin estis forigitaj, persekutitaj kaj multe suferis.

Al tiuj ĉi ambicioj obeeme ankaŭ servis la sekureca/policia/-aparato. Tiel ne estis nur en la granda Sovjet-Unio,sed ankaŭ en la Popoldemokratioj.Ofte eĉ la "lemantoj"estis pli fervoraj k. severaj ol ilia ambicia majstro postulis.

Tion mi nur mencias tial,por ke vi konsciiĝu en kia situacio la esp-istoj devis labori, kiamaniere lerte kaj kuraĝe,por ne rikolti gravajn domaĝojn dum tiu reĝimo. Ni ja scias ke la tezoj de Stalin al la Lingvoscienco kontraŭis Esperanton,ĉar li allasis kreiĝon de internacia lingvo nur post paso de ne transvideblaj jarcentoj kaj ni propagandis ĝin jam en tiu ĉi tempo,kaj sufiĉe energie kaj vigle.Tiuj ĉi batalantoj nuntempe fariĝas herooj de la pasinto. La sin saĝe opiniintaj esp-istoj,kiuj tuj post la unua ekblovo de pli akra vento kaŝiĝis sub la tabloj por ne rikolti domaĝon,nun montriĝas malkuraĝuloj,dume la aliaj fariĝis herooj. Nun,kiam la ŝtormo trankviliĝas,nepli estas merito el sub la tabloj kuraĝe eliri al plua agado. Sed ni tamen bonvenigas ankaŭ ilin. Rud.BURDA.

## LA ŜANĜANTA MONDO

La kondiĉoj de la nuna homvivado rapidege ŝanĝiĝas. Tiun fakton bone scias ĉiu homo,kiu iel rilatas la aferojn ekster la kvar muroj de sia familia domo.Eĉ nura izoliĝo fizika ne sufiĉas;necesas ankaŭ decida fermo de la cerbo k. plenvola fortiriĝo for de aktualaj problemoj hodiaŭaj. Ofte ni renkontas tiujn,kiuj forpuŝas niajn provojn interesigi ilin pri gravaj aferoj politikaj per la vortoj:"Tiaj aferoj estas ekster la mia komprenoblo". Kaj foje kun tiuj vortoj kuniras maliceta ekrigardo,kiu klare signifas,"ekster la via ankaŭ,do,kial vin ĝenu?".

Akceliĝo de ŝanĝoj estas vera fenomeno de la hodiaŭa mondo.Antaŭ malpli ol cent jaroj homo povis serene teni opinion saman kiel la patro kaj avo kaj dumvive alia opinio ne estis altrudata.

Sed hodiaŭ estas afero tute alia. La diferenco inter la moviĝanta sablo de nuna socia kaj politika mondo,kaj la relativa,fiksita vivado de la praula epoko venis al mi okulfrape kiam mi legis fragmenton de la freŝdate publikigita verko de Churchill - "La Historio de Anglio".

En la jaro 1294 la reĝo Eduardo almilitis kontraŭ Francio. La impostoj trudataj al la popolo kaj la eklezio instigis movojn,limigi la feŭdajn rajtojn de la reĝo kaj ĉesigis la militon. Eduardo tiam sin turnis al la tasko plifirmigi la regnopotencon tra la tuta Britio. Ĉe la okcidenta parto de Britio sidlokas la malgranda nacilando Kimrio. Siatempe la romaj, saksaj kaj normandaj regpotencoj malsukcesis al si subigi la Kimranojn. Eduardo ŝanĝis la karakteron de sia armeo -de feŭdalaj ser-

vutu oj devigitaj servi kiel sol-
datoj dum kelka tempo - al daura
profesia armeo.Jen forpasis milit
-koncepto,kiu ekzistis dum jar-
centoj. Eduardo sukcesis kontraŭ
Kimrio. Tiu militiro malkovris an
-kaŭ novan batalilon kiu tute ŝan
-ĝis la milit-strategion.De la 5a
jarcento la ĉefa ero de la milit-
povo estis la metale protektita
ĉeval-rajdanto. Eduardo trovis,ke
la Sud-Kimrianoj jam perfektigis
novan tipon de paf-arko.Sago pel-
ita de tiu longa paf-arko kapabl-
is mortige trapenetri kirasojn eĉ
de iom da distanco. Kaj tiel for-
pasis la supereco de kirasita ĉe-
valsoldato kaj naskiĝis armeoj de
piedsoldatoj kies ĉefa armilo es-
tis mortiga,akurata,malpeza,faci-
le havigebla kaj ebligis ambuski
la malamikon.

Kvankam tio okazis antaŭ 650 ja-
roj,ekzistas en la oficialaj ar-
ĥivoj dokumenta raporto de spert-
hava angla generalo,kiu pledis
post la batalo ĉe Waterloo/j.1815/
ke la anglaj soldatoj estu denove
ekipotaj per la longa paf-arko ki
u,li diris,estas armilo supera al
la tiutempa karabeno.

En dek jaroj -1945/1955 - la A-
bombo kreskis al H-bombo kiel ku-
niklo al elefanto kaj al tipo kiu
nedas en la manojn de militprepar
-antoj detrupovon senliman.Ni pau
-zu momente por pripensi ...
date sciencistoj trovis
de radioaktiveco en la ostoj de
ŝafoj kiuj sin nutris sur la sam-
aj montoj de Kimrio kie la invad-
inta rego Eduardo malkovris novan
milit-revoluciigan batalilon an-
taŭ 650 jaroj. La kvanto de radio
-aktiveco ne estas alarmiga,sed
teorie ĝi venis el la H-bomboj de
la Pacifiko; kaj igas nin memori,
ke la H-bombo povas venenigi la
plantojn,la plantoj la bestojn,
kaj la bestoj la homojn.

La rapidegaj politikaj ŝanĝoj
ankaŭ povas malfortigi la pacmov
-adon. Multe disvastiĝas la opin
-io,ke,ĉar Sovjetio posedas la
H-bombon kaj gisdatajn ilojn por
alceligi ĝin,la mondpotencoj ti-
mos ĝin uzi; pli kaj pli disvast-
iĝas la kompreno,ke la malvarma
milito jam cedis la unuan lokon
kaj la emfazo estonte estos je
politika,ekonomia kaj diploma-
tia kampoj. Ali ... aferoj kiuj
dologos la atenton de la popola
pacmovado estas la redukto de
soldatnombro fare de Sovjetio,
malpliiĝo de monda tensio kaj
la gravaj ŝanĝoj en la sovjeta
politiko.

Pro sam-niveliĝo de la du an
-tagonistaj mondpartoj estas
tre facile akcepti la komfortan
teorion,ke nun la diplomatio
povas,eĉ DEVAS,eviti militon.
Akcepto de tiu tro optimista,
kaj laŭ mi,tute falsa koncepto
kondukus al psikostato,kiu mal-
pli kaj malpli vidus la neceson
de tutmonda pacmovado.Estas ve-
re,ke lastatempe okazis kelkaj
notindaj kontaktoj inter Sovjet
-Unio kaj okcidentaj landoj.Re-
ciprokaj amikecaj vizitoj de ba
-letaj,teatraj,artistaj kaj
sport-grupoj estas tre dezirin-
daj kaj ĝojigaj aferoj, - sed
tute ne certigantaj la mondpac-
on.-

Ni ne preterlasu la fakton,ke
la kapitalismo tre ruze eluzas
la nunan situacion: sin brust-
frapante ĝi deklaras ke la pli-
boniĝita situacio estiĝas ĵus
sekve de la "politiko de forto"
flanke de la "libera mondo" kaj
estus granda krimo malpliigi ti
-un ĉi "forton"ĉar la paco de-
pendas de la plue kresko de ilia
"politiko de forto".

S-ro.Ni... eksprezidanto de
Usono vizitante Anglion publike
deklaris: "La minaco/=komunismo/
estas nun pli granda ol iam".Li
ehis la vortojn de Eisenhower
kaj Dulles. La ŝtatkabineto de
Britio jam komencis konstruadi
militŝiparon de "atoma epoko".
Ili fiere proklamas ĝin,la Milit
-ŝiparon de 1970. Ili planas
"sendependajn militŝip-trajnojn,
kiuj operacios el "izoligitaj
bazhavenoj lokigitaj tra la mon-
do.

Tio certe ne estas lingvo de
paco ! -

Ne sufiĉas pacon dezirantaj mi
-loj da homoj disigitaj tra mul-
te da nacioj. Tiuj homoj devas
esti konvinkitaj ke eblas certigi
la mondpacon kaj devas ankaŭ en
tiu senco por la paco batali.Kaj

tio eblas nur, se ili sukcesos devigi siajn registarojn konservi la pacon. Same kiel la pacifistoj luktas, ne kontraŭ la malamiko, sed kontraŭ siaj propraj regantoj, tiel ankaŭ la popoloj devigu siajn proprajn registarojn sin turni al la paco.

La nunaj rapidaj ŝanĝoj ne eliminas la neceson organizi la pacon inter la popolamasoj - male, la neceso pli urĝas. Mia opinio estas, ke la plej urĝa bezono estas, ellabori universalan pacplanon. Tiel ni allogu la pacdezirantojn al la standardo de la tutmonda pactendaro!

Kion opinias la MEM-anoj pri la ebleco elpensi planon por malarmigo; planon, kiun la pacmovado prezentu - ne al registaroj, sed ni ataku ilin pere de iliaj popoloj, kiuj mem devigu ilin al malarmigo!

Konkura ellaborado de tia plano stimulus nian movadon kaj donus al ĝi veran celon.

C. FIELDING
BRISTOL-Anglio

## LA SESA TUTMONDA

El sovjeta ĵurnalo "JUNECO", aŭtoro: Ju. OVSJANNIKOV.

Miloj da gejunuloj ankoraŭ memoras la lastajn tagojn de la Kvina Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj en Varsovio. Antaŭ la forveturo el la pola ĉefurbo ili longe vagadis tra la urbo, interŝanĝis adresojn, autografojn, skribis reciproke en memorlibrojn varmajn amikajn vortojn: "Ni ne deziras =ADIAŬ=, ni diras =Ĝis revido=".

Tiuj frazoj sonis en lingvoj de ĉiuj popoloj. Ili esprimis firman deziron revidi, renkontiĝi dum la Sesa Tutmonda Festivalo.

La lastan tagon de la festivalo la partoprenintoj eksciis, ke la venonta renkontiĝo de la mondjunularo okaziĝos en Sovjet-Unio. Kaj tiam eksonis super la urbo nur unu vorto, klara por ĉiuj "MOSKVA!" Ĝi estis prononcita kun manpremoj, ĉirkaŭbrakoj, svingado per bukedoj de floroj el vagonaj fenestroj. La simbolo de tiuj tagoj estis figuro de junulo kun levitaj manoj super sia kapo en firma manpremo, kvazaŭ saluto al la forveturintaj trajnoj per la vortoj "Ĝis renkonto en Moskvo"!.

La Sesa Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentoj okaziĝos la 28an de julio ĝis 11an de aŭgusto 1957 en Moskvo. Gejunuloj de diversaj mondkonceptoj kaj politikaj konvinkoj demonstracios sian volon al paco, unueco kaj reciproka fido. Dekkvin tagojn daŭros la festo de la junularo veninta el ĉiuj kvin kontinentoj. La preparo al ĝi nur komenciĝis. Ankoraŭ akre disputas pentristoj, kiel ornami la moskvajn stratojn kaj bulvardojn, ankoraŭ komisionoj ekzamenas dekojn da skizoj de plakatoj kaj poŝtkartoj. Ĝis profunda nokto sidas regisoroj kaj spektaklogvidantoj prilaborante programojn de teatraj prezentajoj. Estas sugestataj multnombraj proponoj kaj deziroj por laŭeble plej interesa kaj brila arango de la venonta junulara renkontiĝo. Ni volas levi la kurtenon de la estonto kaj transdoni en ĝeneralaj trajtoj specimenan programon de la festivalo. Eble multo ŝanĝiĝos ankoraŭ, iĝos pli pitoreska, sed multo jam estas klara kaj multon oni povas jam rakonti.

....Dekses, dudek, dudekkvin, tridek mil delegitoj . . . .
Ni jam kutimiĝis, parolante pri tutmondaj festivaloj, uzi grandajn nombrojn. La kolonoj de moskvaj partoprenantoj etendiĝos de la Manegplaco ĝis la Leningrada ŝoseo. Pli ol tridekkvin mil junaj batalantoj por paco, amikeco kaj reciproka fido! ...

Provu rigardi landkarton, kalkuli konatajn landojn. Estas interese, kian nombron vi atingos: =90=, =100=, =110=?... La partoprenantoj de la festivalo venos el pli ol 120 landoj. Ministo el Wales, fiŝkaptisto el Nagasaki, lignohakisto el Rovaniemi kaj negro el Kongo, brutbredisto el Gvenslando kaj laboristo el kafoplantajoj de Sao Paulo venos al sia festo en unu el la plej grandaj mondĉefurboj, Moskvon.

Se ni loĝigus niajn gastojn en tendoj, kiel la plejmulto loĝis dum la Berlina festivalo,

necesus konstrui tutan tendaran urbon. La partoprenontoj de la sesa festivalo loĝos en komunloĝejoj de la universitato, institutoj, hoteloj de la Tutunia Agrikultura Ekspozicio.

De la Jaroslava ŝoseo, kie situas la hoteloj ĝis la urbocentro estas multaj kilometroj da vojo. La gastoj atingos ilin dum nepli ol 30 minitoj. Al ilia dispono estos multaj autobusoj kaj automobiloj; kiu deziros – veturos en trolejbuso, tramo aŭ metropoliteno. La moskvaj konduktoroj vidonte insignon de festivalano ne postulos pagon, sed eble petos la nekutinajn pasagerojn doni aŭtografon por memorigo.

Multaj trolejbus-linioj estos aliigitaj. La Ĝardena ringo, Bulvarda ringo, Puŝkin-placo fariĝos gigantaj estradoj, koncert-haloj, dancplacoj. Ornamitaj per plakatoj, transparentoj, floroj, girlandoj, paper-lanternoj, tage superverŝitaj de radioj de la augusta suno kaj vespere kaj nokte per blue-blanka lumo de projektoroj, ili transformiĝos por 15 tagoj en "Aleon de Liriko", "Placon de Unueco", "Prospekton de Konkordo", Straton de Frateco" k.s.

Sed ne sole tie estos koncertoj kaj prezentajoj de la festivalpartoprenantoj. Oni povos vidi ilin en la Centra parko de kulturo kaj ripozo, en la parko "Sokolniki", en la Tutunia Agrikultura Ekspozicio, en hipodromo, en granda Moskva stadiono en Lujniki. Ĝuste tie la 28. de julio ekflirtos la blanka flago de la Sesa Festivalo, solene marŝos la delegitaro kaj malfermiĝos mitingo.

La sekvontan tagon.....sed antaŭ ol paroli pri tio, kiel procedos la plua festo, ni memorigu kion skribis la gazetoj pri la Varsovia Festvalo: "Homo, deziranta ĉeesti ĉiujn aranĝojn de la kvina festivalo, devus dum 70 jaroj ĉiutage de la 6a matene ĝis la 12anokte viziti koncerthalojn, teatrojn, klubojn, stadionojn ktp.".

Estas elkalkulite, ke dum la tagoj de la Moskva Festivalo li bezonus por tio ne 70, sed 95-100 jarojn. Ja ĉiutage okazos proksimume 400 diversaj aranĝoj.

Konsiderante, ke ĉiuj haloj de moskvaj teatroj, kluboj kaj somerestradoj kapablos akcepti samtempe 85mil homojn, ĉiu komprenos, ke tute ne ĉiu el la Moskvanoj, dezirantaj konatiĝi kun prezentajoj de la festivalanoj, kapablos efektivigi tion.

Tamen se vi ne trafos en teatran aŭ kluban halon, ne ĉagrenu! Vi povas esti ne nur rigardanto, sed eĉ partoprenanto de la grandiozaj amas-solenoj. Karnevalo en la Centra parko de kulturo kaj ripozo, k. sur la Lenin-montoj, akvofesto sur Moskvo-rivero. Vestite en karnevalkostumo kun masko, vi povas eniri la buntan dancringon, kie de unu flanko vian manon prenos gaja paŝtisto el Teksas kaj la alian eta fraŭlino el Phenjan. Viaj kunuloj laŭ la dancringo al tiu momento jam konatiĝos. Ankoraŭ antaŭ tio ili ĉeestos renkontiĝon de gejunuloj el Ameriko kaj Koreio. Ja ĉiu tage okazigos 30-35 renkontiĝoj inter delegitaroj. Ne estos nur renkontiĝoj inter reprezentantoj de diversaj landoj, la programo de la festivalo enhavas vesperojn de popoloj de Europo, Azio, Afriko kaj Latin-amerikaj ŝtatoj.

Unu el la 15 tagoj de la festivalo estos tute ekskluzive virina. Dum tiu tago vi povos nenien iri kun via koramikino. Ĉiuj virinoj estos okupitaj. Ili kunvenos por rakonti reciproke pri sia vivo, komuniki planojn kaj revojn de estonto, akcepti komunan juron – batali ankoraŭ pli energie por la paco kaj amikeco en la tuta mondo. Kaj junaj socialistino el Romo, kaj membro de Kristana Asocio de junulinoj el Londono, kaj junkomunistino el Pekino – ili ĉiuj volas la samon: ke iliaj infanoj en estonto povu trankvile dormi en siaj litetoj kaj ne timi eksplodojn de bomboj kaj obusoj.

Multaj sendube estos allogitaj al vespero de scienca fantastiko. La ĉeestantoj aŭdos rakonti eminentajn specialistojn-scienculojn pri tio, kiel ŝanĝiĝos nia tero post 100 jaroj, se la atoma energio kaj ĉiuj plej modernaj atingoj de la scienco kaj tekniko estos utiligitaj por pacaj celoj. Kiu ne suk-

cesos viziti či vesperon,povos
legi detalan raporton en la fes-
tivala gazeto.
Dum tiuj tagoj vi povos esti
atestanto de nervstreĉaj sport-
bataloj.Ili estos bataloj de ku-
raĝoj,lertoj,scipovoj pro sekun-
~~ĝoj kaj dekonoj de sekundo,pro~~
metroj kaj centimetroj.Pafoj el
startpistoloj aŭdiĝos sur la kur
-vojetoj de la nova stadiono en
Luĵniki.Aviomotoroj hurlos super
la Tuŝina aerodromo dum la tago de
aersporta festo.Tie vi vidos flu
-gojn de sportaviadiloj,saltadon
de paraŝutistoj ktp.
Sed kion fari,se vi ne povos
mem veni al la festivalo? Ne ĉag
-renu! Ĉiutage,la gazetoj,radio
kaj kinoj detale rakontos pri ĉi
-uj prezentaĵoj de la festivala
programo,pri ĉiu renkonto en la
grandioza festo de la junularo.
Nur el eksterlando venos Mosk-
von ĉirkaŭ mil korespondantoj k.
pli ol cent kinooperatoroj. Ili
ĉiuj loĝos en unu el la plej
grandaj hoteloj de la urbo,"Mos-
kvo". Tie lokiĝos ankaŭ presofic
-ejo.El ĉiuj partoj de la urbo
venos tien informoj pri la paso
de la festivalo. En ajna minuto
oni povos tie informiĝi kie pa-
sas [illegible] prezentis
sin plej sukcese,kiu venkis en la
ve[illegible]urado.Tie oni rakontos al vi,
kiu gajnis oran,argentan,bronzan
medalon en konkurso de pentrarto,
muziko,danco,literaturo.
Sed por ĉion ekscii eĉ ne estas
necese viziti la presoficejon.En
ĉiu ajn kiosko vi povos aĉeti ĉiu
-tagan ekstragazeton "FESTIVALO",
Presita dukolore,kun abundaj fot-
oj,ĉi gazeto longe memoriĝos pri
la gajaj kaj interesaj tagoj. En
la kioskoj samtempe eblos aĉeti
insignojn,permitaĵn kaptukojn,
poŝtkartojn,albumojn.Kun kia inte
reso kaj envio ilin rigardos viaj
amikoj kaj konatuloj post kiam vi
ilin montros hejme!
Ĉina proverbo diras: "Se vi vo-
las sekuri la estontan jaron,semu
milion. Se vi konsideras jardek-
ojn,plantu arbojn." Dum la antaŭ-
lasta festivaltago ĝiaj partopren
-antoj faros grandan kaj seriozan
aferon. Kiel signon de amikeco k.
unueco de popoloj,ĉiu el ili plan
-tos arbon. De la Universitato sur
la Lenin-montoj en direkto al la
apudmoskva urbo Kunĉevo kreskos
nova granda parko - "Parko de Ami-
keco".
Malfrue vespere,post finala mi-
tingo,venos la festivalanoj.Lumi-
gitaj de brulantaj torĉoj en ĉi
neordinara arbaro,kie la arboj a-
tingos nur kokson,la gejunuloj si
-milos al fantaziaj gigantoj.Ilia
fantazia marŝo simboliĝos potenc-
an forton de junaj batalantoj por
la paco.Ili denove kaj ree memor-
iĝos al ĉiuj: se la tuta gejunul-
aro de la tero kunligos siajn ma-
nojn kaj diros al la milito =NE!=
- neniu kapablos skui la pacon in
-ter la popoloj.

Esperantigis:
N.DANOVSKIJ-MOSKVO.

Niaj gek-doj bonvolu transdoni
ĉi artikolon al la redakcioj de
sialandaj junulargazetoj por pub-
likigo.Tiamaniere ili denove tro-
vos eblecon kontakti kaj akcenti
la valoron de Esperanto. Al la re
daktoro de la moskva gazeto nece-
sus skribi multnombrajn leterojn
kun instigoj kaj proponoj kaj sam
-tempe postuli eldonon Esperant-
lingvan de la "Festival-jurnalo".
Nur se ni grandskale sur ĉiuj
bazoj aktive laboros,eblos atingi,
ke tiu ĉi festivalo fariĝu grand-
parte samtempe Festivalo de junaj
esperantistoj. P.BURDA

La adreso de la redakcio estas:
JUNOSTJ.[illegible] V.Katajev,
Ul.Vo[illegible]skogo 52,[illegible].SU.

## JAM PLUV[illegible]AS

Antaŭ nelonge la Ministerio de
kulturo/Moskvo Centro,Ul.Kujbiŝe-
va 10/ ricevis demandojn el Uru-
gvajo kaj Kanado.La demandintoj
interesiĝas pri la stato de la Es-
peranto-movado en U.S.S.R.,pri ĝia
organiza formo kaj petas abonigi
ilin al sovjeta Esperanto-ĵurnalo.
Ankoraŭ tia ĵurnalo ne ekzistas,
Sed certe baldaŭ ĝi aperos. Tia-
specaj "interpelacioj" certe pli ra-
pidigos la solvon de tiu ĉi prob-
lemo. Necesas ne nur pluveto, sed
pluvego! Notu la adreson kaj skri-
bu ankaŭ vi! N. Danovskij

## KONGRESO DE ĈEĤOSL. ESPERANTISTOJ

TKKE decidis arangi la tutŝtatan
kongreson la 21.de oktobro 1956 en
la urbo Olomouc.Jam nun arangu vi-
an libertempon kaj esteraĵn prepar
ojn por via partopreno.Detalajn in
-formojn ni publikigos venonte.

## NUR MALFORTAN EĤON

trovis nia kelkfoja admono al la konscienco de niaj abonantoj. Elĉerpigis fine niaj financaj rime-doj. Ni jam aparte dissendis al kelkaj ŝuldantoj poŝtmandatojn kun admono renovigi la jarabonon por 1956. Kelkaj dekoj eĉ ankoraŭ ne pagis por 1955. La admonaj leteroj kaŭzis al ni novajn elspezojn, sed nur malmultaj komprenis nian malfacilan situacion kaj la ŝulditan sumon sendis. Tio devigas nin efektivigi nian antaŭan averton. Tiu ĉi n-o konsistas nur el 6 paĝoj. Sekve multan valoran materialon ni devis meti flanken pro manko da loko. Tiel okazigos ankaŭ estonte, ĉar mankas al ni la abonpagoj de pli ol 200 legantoj. Estonte ni eĉ ne povas respondi la ricevitajn leterojn, se vi ne aldonos poŝtafrankon.

La redakcio.

## AL MONTOJ DE NACIOJ !

De Antonín CHRÁPAVÝ

Nur sur voj´de am´, homaro,
iru tra l´mondvalo !
Se kanonoj kampojn plugas,
mankos gren , sekalo.
Vi, volante daŭran pacon
sur la tuta tero ,
gin atingu, gin konkeru
per armil´de Vero !
"Vero Venkas" ,jam de longe
estas la devizo.
Vero gvidos la popolojn
al kor-paradizo.
Ni ne stumblu gin sekvante,
paŝu ni kurage ,
kiu Veron, Amon sekvas ,
tiu agas saĝe .
"Semu Pacon ,ĝin rikoltu",
diras lego dura ,
povas gin neniam streki
man per plum cenzura !
Voku "FRATOJ!" al la montoj,
jena venos stato :
Montoj, rokoj al vi eĥos
ĝoje: "FRATO, FRATO!"

## NI RECENZAS

EZOPA SAĜO de Koloman KALOCSAY. Bele bindita libro en kiu prezentigas historiaj fabeloj de Ezopo majstre transdonitaj en formo de poemoj pere de la eminenta hungara Esperanto-poeto Kolom.Kalocsay
Vere multaj homoj ankoraŭ nuntempe povas ĉerpi el la historia saĝeco de Ezopo. Por la poemoj Kalocsay uzas kelkajn novajn vortojn, kiujn ni ne aprobas, ekz.:kial diri "kurta" se ni havas bonan Esp. esprimon "mallonga", ktp. Eldonejo: KOMUNA KONVERSACIA KLUBO, Randbolvej 4, KOPENHAGO F., Danlando. Tiun ĉi libron ni varme rekomendas.

CIRKAŬ LA NASKIĜO DE MIA MISIO: de Martinus, Danlando. El dana lingvo tradukita de C.Graversen. Kontrolis Literat.Komitato de SAT. Formato: 13x19 cm. 57 paĝoj en verda tolkovrilo kun ora emblemo. Eldonis: Spiritscienca Instituto de Martinus, Mariendalsvej 94-96, KOPENHAGO F., Danlando. En tiu libreto Martinus klarigas, kio lin kondukis al la misio pruvi postmortan vivon al la homoj laŭ scienca vidpunkto. Lia verko estas tre interesa kaj certe leginda. Ĉar ankoraŭ ne eblas rekte pagi el Ĉeĥoslovakio, niaj legantoj petu ambaŭ recenzitajn librojn de siaj okc.landaj amikoj kaj rekompencu ilin per jarabono de LA PACDEFENDANTO.

"PROMETEO" trimonata sendependa revuo por kulturo. 32 paĝa. Eldonis: Japana Esp.Librokooperativo, OSAKA, Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodo-ku.

## KORESPONDI DEZIRAS:

K-do.Walter NITSCHKE, Karl-Marxstr. 51, BURGSTADT/Sa., Germanio-DDR, kun ĉ.landoj pri div.temoj. Interŝ.fot. gaz., il.p.k.ktp.
K-do.Zdeněk FLUXA, /studento/ Kaštanová 11, PLZEŇ, Ĉeĥoslov. kun ĉ.land. pri kulturo kaj literaturo. Interŝ. il.p.k. Nur anglalingve por perfektivigi per skriba konversacio en tiu ĉi lingvo. Certe respondos.

## MUNICIO POR NIA BATALO

| | |
|---|---|
| K-do.A.Csáder-Bratislava... 2.-Kčs | K-do.F.Pytloun-Poděbrady... 5.-Kčs |
| K-do.Vr.Kučera-Plzen.......10.-" | K-do.L.Proskovec-Plzen..... 2.-" |
| K-do.J.Ballay-Brno........ 7.-" | K-do.V.Sládeček-Karviná.... 4.-" |
| K-do.K.Kraft-Obořiště......15.-" | K-dino.A.Jermářová-Ostrava. 5.-" |
| K-dino.A.Majtnerová-Ostrava 5.-" | Daŭrigo venonte. Sinceran dankon! |

Eldonis: Okresní výbor obránců míru-odbor esperantistů -MIKULOV -
Redaktis: K-do.Rudolf BURDA, Palackého nám.6, P L Z E Ň , Ĉeĥoslovakio